

# Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 22.2.2012

## **Grava persono en Brno** **Doc. RNDr., MVDr., H.c. Ing. Jaromír Šikula, CSc.** *Věra Podhradská*



Por mia hodiaŭa parolado mi elektis unu gravan personon en Brno, kiu estas ankaŭ tre grava por ni esperantistoj. Temas pri s-ano Jaromír Šikula. Krom tio ke li estis vere estimata kaj publike konata persono, estis ankaŭ fame konata esperantisto, multjara membro de nia klubo. Li kiel komitatano ofereme laboris por nia klubo kaj ankaŭ por esperanta movado ĝenerale.

S-ano Šikula naskiĝis 29-an de majo 1924, en Brno li estiĝis multjara instruisto de Veterinara kaj farmaceŭtika universitato en Brno, aŭtoro de diversaj botanikaj lernolibroj.

Doc. Šikula, ankaŭ edzo, patro kaj avo travivis belan kaj altvaloran profesion vivon, kiu komenciĝis jam en lia junaĝo. La unua motiviga elemento estis lia skolta grupo, kiu lin lernigis al naturrilato, respekton al scienco kaj kredon al pozitivaj vivvaloroj. Lia grava periodo estis lia studado en gimnazio. Dum studado en Agrikultura altlernejo venis „unua fatala frapo“ - malsano - paralizo. Eĉ pro negativaj prognozoj post longa rekapablado ankaŭ helpe de lia edzino, li ekkomencis moviĝi, kvamkam li restis tutan vivon handikapita. Post fino de studado en menciita altlernejo, li ne finis klerigadon, sed daŭrigis studadon en Naturscienca fakultato de universitato en Brno, jam dum sia entrepreno, denove

helpe de sia edzino, kiu estis lia dumviva kunulino kaj kolegino. S-ino Jarmila Šikulová estis ankaŭ multjara membrino de nia klubo, nun ŝi vivas kun sia filo. Pos fino de studado li fariĝis asistanto en altlernejo kaj povis plue dediĉi sin al sia laboro. De tempo al tempo li akceptadis bonan pozicion kaj komencis disvolvi sian scian laboron. Sed venis „dua fatala frapo“ - forpasis lia 11-jara filo je leŭkemio. Tio tre influis vivon de la tuta familio. Sapiro restis en lia penso. Sed lia talento daŭrigis laboron. Li ekkomencis publikigi, prelegis, transdonadis siajn spertojn al studentoj kaj dediĉis sin al ampleksa scienca kaj sciencpopulara agado. Kiam li jam estis preskaŭ en la kulmino mem de sia kariero kaj estis preparita akiri adekvatajn poziciojn por utiligi siajn sciojn por bono kaj famo de botanika institucio, aperis „la tria frapo“. La jaro 1968 estis tute alia frapo. Tiun li ne povis suferi per sia volo, diligento aŭ sciado. Venis de ekstere, direktita kaj influita de diversaj „nomeklaturanoj“, kiuj ne bezonis en sia proksimeco klerigitajn kaj noblecajn personojn. Pro tio verdikto de „normaliga komisiono“ estis tute strikta - Funkcia kaj scienca avanco evitinda !!! Nur dank' al fakto, ke lian laboron neniu povis anstataŭigi, li restis kiel simpla instruisto en la altlernejo.

Malgraŭ tio ĉio trovis sinjoro Ŝikula denove elirsolvon en sia talento kaj diligenteco. Li komencis polarigi siajn labor rezultatojn. Li skribis studmaterialojn, lernolibrojn, prelegis, kolektis kvantojn da diversaj informoj, simple senĉese laboris. Kaj ĉefe, li „amis“ studentojn kaj junaĝon.

Liaj sukcesoj kaj reputacio ĝenis la pli malmulte talentajn. Li ofte diris: mi estas libera, mi ne bezonas perdi tempon de diversa kunvenado kaj administrativa agado de gvidorganoj, mi povas daŭrigi en mia memklerigo.

En jaro 1989 li jam estis emerito. Sed tiuj, kiuj estimis lian laboron, brilaj kolegoj, studentoj, konvinkis Jaromír Ŝikula al reveno en lernejon. Post ne longa tempo li kreditigis pli ol dek-jaran rifuzitan docentecon kaj atingis eksterordinaran aprezon por pli ol 40-jara laboro kiel altlerneja instruisto, kiam li en la jaro 1993 estis diplomita kiel „doktoro de veterinara medicino honoris causa“, por lia laboro kaj vivo de altlerneja instruisto, al kiu li dediĉis sian tutan vivon. S-ro Jaromír Ŝikula forpasis la 29-an de majo 2000.

Li publikigis entute 13 publikaĵojn en la ĉeĥa lingvo, 3 en Esperanto, 1 en la germana lingvo.

En la ĉeĥa lingvo li verkis jenajn librojn:

- Botanika veterinární (Botaniko veterinara, 1957, 1960),
- Návod k praktickým cvičením z veterinární botaniky (Instrukcio por praktikaj ekzercoj pri veterinara botaniko, 1957),
- Jak dosáhnout vysokých výnosů (Kiel atingi altajn rezultojn de produktado, 1961),
- Veterinární botanika a pícninářství (Veterinara botaniko kaj furaĝistiko, 1964),
- Cvičení z botaniky a pícninářství (Ekzercaro pri botaniko kaj furaĝistiko, 1965),
- Veterinární botanika a základy zemědělství (Veterinara botaniko kaj fundamentoj de agrikulturo, 1969),
- Zemědělská encyklopedie (Agrikultura enciklopedio, 1971),
- Rostlina a prostředí (Planto kaj medio, 1974),
- Zahradkářský informátor (Ĝardenista informilo, 1976),
- Zelenina, rostliny kořeninové a léčivé (Legomoj, plantoj radikaj kaj kuracaj, 1977),
- Cvičení z pícninářství (Ekzercaro pri furaĝistiko, 1980),
- 25 let brněnského zahradkářství (25 jaroj de ĝardenistiko en Brno, 1982),
- Cvičení ze základů rostlinné výroby a pícninářství (Ekzercaro pri fundamentoj de plantoproduktado kaj furaĝistiko, 1986).

En Esperanto

- Indekso de semoj (1958-1959),
- Indekso de semoj (1966)
- Botanika ĝardeno en Brno (1960)
- Nutraĵoj sen venenoj (Starto 3/1991)
- Kulto de la plantoj kaj floroj (Starto 2/1992)
- Kuracaj plantoj en la historio kaj nuntempe (Starto 1/1993)
- Tradicia kaj moderna medicinoj (Starto 1-2/1994)

En la germana

- Taschenatlas der Gräser (Poŝatlaso de herboj, 1977)